

LA PESTO

Personoj:

LI Viro 30-50 jara
ŜI Virino 30-50 jara

Kafejo ĉe la maro. Tabloj kun buntaj sunŝirmiloj kaj seĝoj. Striita tolmarkezo. Flagoj. Forta sunbrilo. De tempo al tempo aŭdiĝas la muĝado de mevoj kaj populara muziko de fora orkestro.

(**LI** eniras portante malgrandan vojaĝsakon kaj ĵurnalon. Li sidiĝas ĉe tablo, elprenas termoson kaj tasojn el la sako kaj metas ilin sur la tablon. Li komencas trafoliumi la ĵurnalon. Legas. Dum li legas, **ŜI** eniras kaj sidiĝas ĉe la sama tablo. Ŝi portas flugfoliojn. Ambaŭ portas somerajn vestaĵojn. Eble portas sun-okulvitrojn.)

LI Ĉu sufiĉas al vi la varmo? Altiĝos ĝis tridekkvin gradoj hodiaŭ, oni anoncis.

ŜI Tian veteron ni ne bezonas. Kial ĝi ne falu ĝis minus tridekkvin por mortigi la blatojn kaj la pulojn? Estas ĝuste la nuna vetero, kiu helpas al tiuj multiĝi.

LI Ili ne detenis vin, do?

ŜI Ne. Ili starigis kordonon ĉirkaŭ la stacidomo, sed kiam mi montris mian identigilon, ili permesis min trairi.

LI Evidente ili atendas ankoraŭ unu trajnplenon el la nordo.

ŜI Supozeble. Sed kial oni fuĝu tien ĉi? Ne estas pli sanige ĉe la maro ol enlande. Malpli, fakte, pro la ratoj el la ŝipoj.

LI Estas simple, ke homoj komencas paniki kaj pensi pri fuĝo, kaj la marbordo ĉiam aspektas pli alloga, pli saniga ol la enlando ... La malordo kreskas, ĉu ne? Homoj vagadas tien kaj reen disvastigante la infekton. Dio scias, kio okazos, se oni ne tre baldaŭ trovos kontraŭ-venenon ... Eble oni komencos mortpafi homojn sur la stratoj kiel vagantajn hundojn ... En la fino la Sanitaraj Taĉmentoj arestos iun ajn, kiu altiros al si atenton ... (Li elverŝas kafon.) ... Kaj ni sidas tie ĉi, en la sunbrilo, trinkante kafon, kun orkestra muziko en la distanco, dum la pesto furiozas ĉirkaŭ ni. Klarigu al mi kiel la korpo povas ĝui kafon dum la menso komprenas pri la pesto.

ŜI Mi ne scias. Sed mi scias, ke oni devas certigi, ke la akvo estas boligita! ... Ĉu ekzistas alternativo? Ni estas senpovaj ŝanĝi aferojn, do kia alternativo restas ol daŭrigi la vivadon kiel eble plej normale?

LI Nu ... tiel opinias vi kaj mi, sed la plimulto ne pensas tiamaniere. Pli kaj pli da homoj komencas disfali. Denuncas la najbaron pri kaŝado de la simptomoj. Infanoj eĉ raportas al la instancoj pri la gepatroj! Ĉiuj nervoziĝas. Aferoj evoluas tiel, ke iu ajn, kiu altiras ies atenton al si, ankaŭ altiras al si la suspekton. Eble en la fino oni linĉos homojn pro tio, ke tiuj portas ruĝan hararon aŭ bluan ĉemizon!

ŜI Jes, vi pravas ... kaj tiom da kultoj kaj ritoj kaj ceremonioj ... Ĉiun tagon leviĝas io nova. Laŭ la nunaj cirkonstancoj tio estas komprenebla, sed kiel utilas tio? Kiel utilas vidi misterajn signojn sur la ĉielo dum la sola bezono estas eltrovo de kontraŭveneno?

LI Ĉu vi legis la ĵurnalon ĉi matene? Pri la eventoj en la nordo? Tiuj Skurĝantoj. Ili ne restas kontentaj simple stari sur la stratoj kaj skurĝi sin per najloj kaj vipoj. Ili anoncas nun, ke ili ne estas ordinaraj estaĵoj, kiuj pentopagas pro siaj pekoj, sed ili estas armeo de sanktuloj ... sanktuloj, kiuj intencas transpreni al si la direktadon de la lando ĝis la jarmilo. Ili pretendas supernaturajn povojn. Ili diras, ke ili povas eligi diablojn el homoj, kuraci malsanojn kaj revivigi mortintojn. Unu el ili eĉ anoncis, ke li mem jam leviĝis el la morto! ... Ne nur tio, ili vagadas de loko al loko altirante al si amasojn da homoj, kaj tiel eĉ pli efike disvastigas la infekton. Streĉas la fortojn de la milicio spuri la adeptojn.

ŜI Nu ... rigardu tion. (Montras flugfolion.)

LI (Laŭtlegas) "La Venĝistoj de la Sanktuloj de Dio nun troviĝas inter ni. La Venĝistoj aperas inter ni, kiel puniloj. La Kolero de Dio atingos egale ĉiun pekinton. Preparu Vin por renkonti la Venĝiston, kiun Dio destinas al Vi. Tiu povas esti la viro aŭ virino, kiu apudas Vin dum Vi legas tiujn ĉi vortojn". ... Tute frenezaj, tiuj homoj ... Ni esperu, ke ili ne fariĝu tro potencaj.

(Mallaŭte aŭdiĝas muziko de fora orkestro.)

ŜI Unu el miaj kolegoj ĉesis labori ĉe la biblioteko, ĉar ŝi devas helpi organizi dudekkvarhoran preĝsesion por preĝi por nia savo ... Nu, mi supozas, ke se oni frontas mortigan malsanon, kontraŭ kiu ne troviĝos kuracilo aŭ eĉ espero pri trovo de kuracilo, tiam ĉia ajn speca konduto fariĝas pli malpli normala ... En la nuna situacio ĉio reduktiĝas al la vivstilo, ĉu ne? Oni povas elekti... aŭ lasi sin esti trenita al la rando de la puto, kriege protestante kontraŭ la maljusteco de la vivo, kaj tiam esti ĵetita en la puton kapantaŭen ... aŭ oni povas per si mem piediri al la rando de la puto kaj malsupreniri en la mallumon per ŝtupareto, silente, neplendante kaj kun iom da digno. La rezultoj de ambaŭ estas la samaj ... La diferenco estas la stilo.

LI Vi pravas. Mi supozas, ke tio, kiu distingas nin de kunikloj kaj ĉevaloj, estas la fakto, ke ni opinias, ke la stilo gravas ... (Paŭzo. Trinkas kafon.) ... Mi provis havigi al ni viajn plej ŝatatajn mielkukojn, sed tiuj elvendiĝis. Mi venis iom tro malfrue.

(Paŭzo. De distanco oni aŭdas laŭparolile fervoran paroladon de oratoro. Oni ne distingas la vortojn.)

LI Auskltu tion! Ankoraŭ unu, kiu anoncas pri la Fina Juĝo ... Homoj, kiuj ne plu kapablas toleri la vivon, kaj koleras pro tio, ke ili ne povas forgesi, ke ili ankoraŭ vivas.

(Paŭzo)

LI Ĉu vi memoras tiun tagon, en kiu ni renkontiĝis? Tie sur la insulo? Kia bela tago! Ni dividis la saman tablon, sur kiu estis sternita blua kaj blanka tuko. Tiam ni sukcesis akiri mielkukojn ... Mi rememoras, ke la reflektado de la suno de la maro preskaŭ blindigis nin.

ŜI Jes ... Kaj tio okazis antaŭ nur ses monatoj. Tiam ni ambaŭ penis akcepti la novaĵojn pri niaj familioj ... Mi pensis tiam, ke mi ne supervivos, se mi neniam plu vidos

miajn infanojn.

LI Nu, almenaŭ vi nun scias, ke ili restas en la sekuro eksterlande, eĉ se vi ne povas atingi ilin. Laŭ la nunaj cirkonstancoj estas pli bone esti for unu de la aliaj, ĉu ne?

ŜI Jes, vi pravas. La pesto tamen ne restas ĉe unu loko. Ĝi eble iam atingos ankaŭ ilin. Mi ne povas ne pensi pri tio ... iasence estas pli facile por vi, ĉar vi jam perdis ĉiujn.

(Paŭzo. La fora voĉo kaj muziko ankoraŭ aŭdeblas.)

ŜI Ĉu vi memoras niajn diskutojn pri kio fari, kiam atingos nin la pesto? Tiam ĉiuj opiniis, ke la sola defendo estas la fuĝo.

LI Jes. Ĉu resti por fronti ĝin? Rezisti, cedi al ĝi? Rezisti la neniigon? Rezisti la detruon de ĉio, kio estas homa ... la konscion ... la teneron ... la kapablon miri? Jes, mi memoras.

ŜI Ni antaŭvidis jam tiam, ke ĉio homa estos detruata de senmensa bakterio ... ke nenio restos de niaj familioj, aŭ de ĉio, kio valorigas niajn vivojn ... la sciencoj... la literaturo ... la muziko ... Ĉio malaperos en la kaoson ... detruita de vagantaj frenezuloj, kiuj loĝas kiel ratoj kun la pesto en ĉambroj, kie iam homoj akvumis florojn kaj okazigis naskiĝfestojn por infanoj ... Tion ni antaŭvidis, kaj nun tio sin manifestas.

(Paŭzo)

LI (Salutas eksterscenejan preterpasanton.)

Bonan tagon! ... Jes! ... Tre varme hodiaŭ ... Jes ... Ni esperu pri tio! ... Ĝis la!

(Paŭzo, dum ili atendas la preteriron de la persono.)

LI Jen ŝi. Ĉiun tagon ŝi suprengrimpos al la tombejo portante tiun korbon.

ŜI Ĉu estas tiu, kiu iras ĉiun tagon al la tombejo por sidi la tutan posttagmezon ĉe la tombo de la edzo?

LI Jes, tiu estas ŝi. En tiu korbo ŝi portas varman akvon, tekrucon kaj tason kaj subtason. Ŝi sidigas sin ĉe la tombo, iam sur la tombo, kaj trinkas teon. Sidas tie ĉiun posttagmezon, dum tri aŭ kvar horoj.

ŜI Kion ŝi faras?

LI Komunikigas kun la mortinto. Ŝi faris tiel ĉiun tagon, de kiam la edzo mortis ... kaj tio okazis antaŭ pli ol unu jaro ... Kompreneble tiam oni ankoraŭ ricevis ĉerkon. Hodiaŭ oni ne plu kapablas produkti ĉerkojn sufiĉe rapide.

ŜI Kion ŝi havas por diri al la mortinto, kio povas okupi tiom da tempo?

LI 'Nekonsolebla aflikto' oni nomas tion. Alia nomo estas 'neestingebla kolero'. Ŝi nun elverŝas sur lian tombon la rankoron kaj malestimon, kiuj alkumuliĝis dum kvardek jaroj. Rankoro pro lia supozo, ke ŝi devus formi sian vivon laŭ liaj deziroj, kaj malestimo al si

mem, pro tio, ke ŝi permesis, ke tio okazu ...

Ĉiuokaze, ŝi nun faras la kalkulon. Devas elpreni la kontolibrojn, demeti ilin sur la tablon, kaj pridiskuti la konton, eron post ero. Do restas al ŝi multo por fari. Sufiĉe multe, verŝajne, por okupi ĉiun posttagmezon de la cetero de la vivo.

ŜI Kiel do vi scias, ke la afero staras tiel?

LI Laŭ mi, bona rilato ne postlasus tiom da nefinita laboro. Bona rilato permesus, ke oni lasu unu la alian restadi en paco post la morto. Sed tiuj du postlasis tiom da neesprimita vivo, ke ĝi ŝvebas en la aero super ili kiel energio, energio, kiu devas iel ellasiĝi. Nu, ĉiuokaze, tio helpas al ŝi trairi la tagojn. Ni ĉiuj bezonas helpon trairi la tagojn ... Kiel sidi tie ĉi trinkante kafon. Iam, antaŭ la pestotempo, trinki kafon estis plezuro kaj nenio plu. Sed nun ni trinkas kafon 'kiel kutime'; estas tio 'kiel kutime', kio gravas nun. Ne temas pri spitado de la pesto. Kiel oni spitu la neeviteblan? Estas simple, ke 'kiel kutime' estas la sola, kio nun restas al ni.

(Sono de fora orkestro.)

ŜI Jes ... tio estas la sola, kio restas. Dum ĉio disfalas, la sola defendilo estas la kutimo. Mi daŭrigas mian laboron ĉe la biblioteko... ordigas la librojn, revizias la indekson, ĝisdatiĝas la stokon, kvankam neniu plu venas por prunti librojn, ĉar libroj portas la peston. Kaj vi daŭrigas vian traduklaboron eĉ se la vortoj neniam presiĝos kaj neniu legos ilin. Oni povas argumenti, ke tio estas sensenca, absurda. Sed precize tiaj estas la taŭgaj okupoj por homoj, kiel ni en la nunaj cirkonstancoj.

(La fora parolado ĉesiĝas.)

LI La pesto celas konverti nin en fuĝantojn, kiuj kuras de loko al loko ĉiam rigardante malantaŭen super la ŝultrojn por kontroli, kiel proksime al ni ĝi atingis. Vi kaj mi trovis ion pli bonan ol tio. Simple sidi ĉe tablo trankvile parolante.

(Paŭzo)

ŜI Oni parolis hieraŭ en la biblioteko pri la ideo, ke iuj aromoj efikas kontraŭ la pesto ... jasmeno, insenco, rozmareno, junipero.

LI Tio ne imponas la peston! Tamen mi konsentas pri la odoro de junipero ... jen io neforgesebla. La odoro de nura fragmento plenigas ĉambron.

ŜI Juniperaj arbustoj ĉiam aspektas tiel magraj, ĉifonaj, ĉu ne? Se oni cirkaŭbrakas ilin, ili forpusas onin per siaj pikiloj. Ili bezonas spacon.

LI Jes, ili bezonas spacon. Oni eliras arbaron kaj vidas nenion krom ŝtonoj kaj malprofunda, malfekunda grundo. Sed jen la juniperoj, kreskantaj el la roko.

(Sono de fora eksplodo. Li rigardas al sia brakhorloĝo.)

LI Akurate! Precize je la horo! Jen afero, kiun ili ankoraŭ sukcesis fari! Kanonpafi ĉiuhore ... Ĉar iuj kredas, ke pulvo purigas la aeron!

ŜI Oni ne surpriziĝu pri tio. Homoj ektenas la plej etan apogilon eĉ se ili scias, ke tio ne efikas.

LI Jes ... La Urba Konsilantaro kompleze faras ĉion tian, eĉ la plej strangajn aferojn, por eviti tumulton ... ion ajn por eviti panikon.

(Li alparolas duan eksterscenejan preterpasanton.)

Saluton! ... kiel fartas la edzino? ... Bone ... jes, dankon ... Jes, varmege hodiaŭ ... tro varme al mi... Dankon ... same al vi... Ĉion bonan! ... (Ĝis la revido!

ŜI Survoje al la poŝtejo, ĉu?

LI Jes. Li ankoraŭ okupiĝas pri tio. Ĉiun tagon li iras al la poŝtejo por kontroli, ĉu alvenis novaĵoj pri lia peto pri patento pri lia inventaĵo. Imagu! ... En la nuna tempo, kiam ĉiu registara departemento plene okupiĝas per kriz-planado! Li ne povas akcepti, ke neniu interesiĝas pri li aŭ pri la rezulto de lia vivdaŭra laborado. Li ne povas eĉ nun rezigni pri tio. Ne povas demeti de la ŝultroj la ŝarĝon de tiu inventaĵo. Li devas ĉiam porti ĝin sur la dorso ĝis la fino de la vivo.

ŜI Estas kompreneble, ĉu ne?

LI Estas kompreneble.

ŜI La propra historio povas pli kaj pli pezigi la dorson dum oni alproksimiĝas al la fino ... se oni ne komprenas kiel malŝarĝi sin ... Kiam mi nun retrorigardas al mia vivo antaŭ la pestotempo, mi rememoras tiun senton de ŝarĝo. Ĉio en tiu vivo havis la propran pezon. Kaj ĉio en ĝi ĵetas la propran ombron ... Sed nun, en la tempo de la pesto, ĉio konturiĝas nekredible akre, sed nenio ĵetas ombron. Oni ne demandas sin pri la signifo de io. Oni ne demandas pri tio, kio staras preter aŭ post io. Ĉio estas memevidenta. Malantaŭ tiu memevidento staras nenio krom la forgeso. La pesto promesas al ni nenion. Donas nenion. La pesto estas dudimensia. Oni povas elekti... oni povas dediĉi la vivon al rigardo al la surfacoj, kaj ne pli ol tio, aŭ oni povas ĝisfunde ekzameni la vivon per mikroskopo por penetri al la profundaĵoj kaj malkovri la sekretojn de la Naturo ... ambaŭkaze, la rezultoj samas. La nescio kaj la scio kondukas al la sama rezulto ... Dum mia vivo mi ne komprenis tion. Sed nun, sciante tion, mi sentas min multege pli malpeza ol mi iam ajn sentis min ... tiel malpeza ... tiel senŝarĝita ... kiel papilio, kiu flirtas en somera venteto.

LI Por mi la pesto kreis spacon. Mi naskiĝis unu kilometron for de tie ĉi... tie ... apud la preĝejo ... Kiam mi aĝis dudek, mi eliris en la mondon por serĉi la fortunon, tiel diri, kaj mi ne revenis ĝis antaŭ ses monatoj, post la morto de mia familio ... Tuj post mia reveno mi promenadis laŭ la montetoj por rigardi la flavajn florojn de la ulekso kaj aŭskulti la kantojn de la alaŭdoj. Iun tagon, mi supreniris la deklivon, preterpasis la muelejon, kaj promenis laŭ kampara vojo, flanke de kiu staris alta muro, muro pli alta ol mi. Tiu muro certe staris tie dum jarcentoj. Ĝi estis konstruita el salikoj de la strando, same kiel multaj muroj en tiu parto de la lando. Kiel infano mi ofte staris antaŭ tiu muro kaj perokule sekvis la neregulajn liniojn inter la ŝtonoj. Dum mia foresto mi ofte pensis pri tiu muro ... Nu, kiel mi diris, mi supreniris la deklivon ... Mi staris antaŭ la muro, eble du metrojn for, staris rigardante ĝin, same kiel mi faris, dum mi estis infano ... kaj subite, sen ke io alia okazis, la muro falis. Neniu troviĝis tie krom mi. La muro simple falis ... Estis maltrankvilige ... Sed por la unua fojo en mia vivo mi vidis tion, kio situas post ĝi.

(Pauzo)

ŜI Jes ... Por videbligi aferon oni ofte devas forigi ion alian el la vidlinio ... Povas esti, ke oni eĉ devas dreni oceanon. Ĝuste tion mi faris dum la pasintaj ses monatoj.. Drenis plenan oceanon. Kaj dum la muĝado de la ondoj kvietiĝis, mi povis, la unuan fojon en mia vivo, aŭskulti.

LI Kaj kion vi aŭdis, dum vi aŭskultis?

ŜI Tio, kion mi aŭdis, estis teruriga ŝirkriegon ... Ŝirkriego, kiun mi nomis 'mia vivo'. Tio, kion mi nomis 'mia vivo' estis fakte seninterrompita kriego, kiun neniu, eĉ ne mi mem, iam ajn antaŭe aŭdis. Sed nun mi aŭdas ĝin. Tiu kriego estas la voĉo de infano ... tiu infano, kiu destinis esti mi, sed al kiu oni ne permesis naskiĝi. Kaj nun tiu kriego elfluas. Mi elsendas ĝin por pleni la universon. La pesto ellasis ĝin. La kolerego kaj timego de tiu infano estas jam survoje al la plej foraj planedoj kaj nenio kapablas haltigi tion, eĉ se la pesto mortigos min morgaŭ ... Tiu kriego estas la malo de la morto. La persono, kiun destinis esti tiu infano finfine estas naskiĝinta. Kaj estas la pesto, kiu naskis ŝin.

(Sono de fora orkestro.)

(Paŭzo)

LI Rigardu ... tiun akcipitron ... Ĝi ĉiam restas en la sama loko rilate al la tero malgraŭ tio, ke la vento blovas tiel kaprice. Kiamaniere eblas tio?

(Paŭzo)

La pesto ne estas io, kio venas al ni de ekstere. La morto kaj la malsano, kiujn ni vidas ĉirkaŭ ni estas nur fajro, kiu forbruligas sekajn branĉojn. La vera pesto estas io en ni mem. La sola maniero fronti ĝin estas konstati tion kaj kompreni. Por fari tion oni bezonas spacon. En normala vivo troviĝas malmulte da spaco. La pasinto kaj la estonto premas nin de ambaŭ flankoj kiel sraŭbtenilo. Ni apenaŭ kapablas movi la membrojn. Tio doloras, sed ni ne povas bildigi al ni alternativon ... Okazas tiel de tempo al tempo dum la vivo, ke io detruas la fundamentojn ... kiel nun faras al ni la pesto ... kaj la tenilo malstreĉiĝas ... La pasinto kaj la estonto malaperas, kaj subite restas al ni sole la nuno. Ni ne plu disponas pri multe da tempo, sed ni ricevas spacon ... senliman spacon, en kiu ni povas esplori kaj serĉi. Kaj se ni serĉos, ni trovos. Kaj pro tio, ke la spaco ne rilatas al la pasinto aŭ la estonto, en ĝi ne troviĝas la morto ...

ŜI Kaj ĉu vi trovis ion per via serĉado?

LI Jes. Mi trovis, ke ĉiu aĵo, kiu ekzistas, ĉiu ago kaj ĉiu evento, kiu okazas, estas unika. La ombro de via brako sur la tablo, la formo de tiuj ŝtonetoj sur la trotuaro, la ekrebrilo de la suno de unu specifa ondo sur la maro, ĉiuj tiuj okazas unu fojon, kaj nur unu fojon, en la historio de la universo, kaj vi kaj mi estas la solaj estaĵoj en la eterno, kiuj konciĝas pri ili. Kaj mi komprenas, ke mia vivo, pro tio, ke ĝi ebligas al mi kompreni tion, estas mirinde sukcesa kaj perfekta.

(Sipa sireno muĝas)

LI Ankoraŭ unu ŝipo alvenas. Estos kaose ĉe la kajo. Ŝvarmos homoj tie kiel formikoj.

Bone estus, se ni iru hejmen. Eble la Sanitaraj Taĉmentoj baldaŭ komencos patroli serĉante enmigrantojn. Tiuj Taĉmentoj fariĝas pli kaj pli nervozaj. Estas pli sekure en la hejmo, kiam la ŝipo alvenas.

(Li komencas forpaki la termosojn kaj tasojn.)

LI Nu. ... ni renkontiĝos morgaŭ en la sama horo, kiel kutime.

ŜI Ne ... Mi ne venos morgaŭ. Ni ne plu renkontiĝos. Estas afero de malgranda makulo sur la haŭto.

(Paŭzo, dum li konsciiĝas pri la signifo de ŝiaj vortoj.)

LI Mi komprenas ... Jes ... mi komprenas.

ŜI Jes ... estas domaĝe ... sed tiel estas.

LI Tio signifas, ke ankaŭ al mi ne restas multe da tempo.

ŜI Verŝajne.

(Paŭzo)

ŜI Ni ne parolu plu. Ni komprenas unu la alian. Oni ne rajtas postuli pli de la vivo.

LI Vi pravas. Oni ne rajtas postuli pli. ... Ni promenadu reen laŭ la strando kaj rigardu la maron. La tajdo ĝuste nun refluas, mi supozas.

ŜI Jes ... ni faru tiel. Ni iru rigardi la maron.

(Ili eliras kune.)

FINO

Origine verkita en esperanto: Harold Brown